

Stefano KELLER instruas Esperanton en Srilanko (2)

Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 124-2-782, 1984

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-124/Radiokasedo-124-2-782-Claude-GACOND-Stefano-KELLER-instruas-Esperanton-en-Srilanko.mp3>

Cl.- Parolas Claude Gacond nome de Svisa Radio Internacia. Hodiaŭ sidas apud mi Stefano Keller, la esperanto-instruisto ĉe KCE, Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds. Kiam Stefano Keller ferias, li provas instrui esperanton en fora lando. Ekzemple, pasint-vintre li iris al Srilanko. S-ro Stefano Keller, vi estis akceptita en Srilanko de esperantistoj, ĉu ne ? Se mi ne eraras, de s-ro Jesudasan, kiu ĵus - kiel vi rakontis la pasintan semajnon - perdis ĉion okaze de lingva kaj etna konfliktoj inter la sinhaloj kaj tamiloj en Srilanko.

SK.- Jes. Post la alveno en Kolombo mi tuj kontaktis telefone s-ron Jesudasan. Li fariĝis la plej fidela kunaganto dum mia kvarsemajna restado en Srilanko. Sindoneme li helpis min en la organizado de aktivecoj : prelego, kurso, personaj kontaktoj kun aŭtoritatoj kaj aliaj. Nelacigeble gvidis min en la nekonata ĉirkaŭaĵo kaj krom la poresperanta agado, li helpis min malkovri kelkajn vidindaĵojn de la regiono. Ni fiksas rendevuon por la posttagmezo. Imagu, estis varmege, inter 27 kaj 32 celsius gradoj tage kaj nokte, dum vi frostis ĉi tie en Svislando...

Cl.- Kun unu metro da neĝo en La Chaux-de-Fonds, jes...

SK.- ...jes, la aero estis sufiĉe humida kaj la sunradioj traboris ankaŭ la nubtavolon. Kutime en tiu senpluva sezono estas konstante blua ĉielo kun forta sunado - almenaŭ tion rakontis al mi ĉiuj, kiujn mi demandis pri la vetero - sed ĉi-foje ne estis tiel. Ofte plennubiĝis la ĉielo kaj la vesperaj pluvadoj ne estis maloftaj. Kaj foje, kiam post unu semajno sinkis la temperaturo ĝis 26 celsius gradoj, mi sentis malvarmon. Sed la indiĝenoj komencis ternadi jam ĉe 27 gradoj. Do, ni renkontiĝis en Wellawatta, kie lia frato havas librovendejon. Li rekonis min sur la strato kaj svingis la manojn jam de malproksime. Ni iris al la loĝejo de lia frato kaj ĉe bongusta teo ni priparolis la programon de la venontaj tagoj.

Cl.- Kaj vi registris, ĉu ne?

SK.- Jes, ni aŭskultu la akceptajn vortojn de s-ro Jesudasan :

« Kiam mi ricevis vian leteron, ke vi vizitos Srilankon, mi tre ĝojis, ĉar mi estas konvinkita, nur pere de kontaktoj kun bonaj eksterlandaj esperantistoj ni povas antaŭenigi esperanton en Srilanko. »

Vi povis aŭdi ankaŭ la klaksonadon de la fiŝvendisto sur la stratoj de Nugegoda, ĉar ni estis en la loĝejo de s-ro Jesudasan.

Cl.- Kaj nun eble rakontu pri la aliaj kontaktoj, ĉar vi iris iomete kiel ambasadoro de Kultura Centro Esperantista al Srilanko, ĉu ne ?

SK.- Jes, la saman tagon vespere ni havis rendevuon kun d-ro Dharmatilake, en lia kuracejo en Kolombo. Ni povas aŭdi kelkaj salutajn vortojn de li :

« SK : Mi kore salutas vin en la nomo de Kultura Centro Esperantista en Svislando !

Dh : Ah, same mi ankaŭ salutas vin, kiel prezidanto de la Esperanto-Societo en Cejlono. Kaj mi estas tre feliĉa renkonti vin, kaj kiam mi ricevis viajn leterojn, ke vi volas prelegi senpage, tio plaĉis min tre multe »

Vi aŭdis ĉi tie ankaŭ la bruojn de la strato, ĉar la kuracejo d-ro Dharmatilake estas ĉe la bordo de grandtrafika strato en Kolombo.

Cl.- Kaj nun, eble vi rakontos al ni iomete, kiel disvolviĝis via restado, tiuj kontaktoj, via vojaĝo en Srilanko, ĉu ne ?

SK.- Jes, ni konversaciis, kaj mi devas konfesi, ke la vortoj de s-ro Dharmatilake ne sonis tre entuziasme. Li diris - mi citas liajn frazojn, kiujn mi registris :

« Eble ili montros iom da interesiĝo dum via prelego, sed tiu interesiĝo foriros la sekvantan tagon kaj ili pensos pri akiro de iom da manĝaĵo. Hodiaŭ ĉiuj ordinaraj manĝaĵoj estas tre altekostaj. Vi provu fari ion por esperanto. Mi ne malkuraĝigas vin. Sed mi dubas. Ni havas multajn problemojn: religiajn, rasajn kaj ŝajne nenio okazas por solvi la situacion. »

Mi proponis, ke kiel lokon de la prelego kaj kurso ni elektu la publikan bibliotekon.

Cl.- Kaj ĉu vi sukcesis akiri tiun publikan bibliotekon ?

SK.- Jes, post kelktaga ŝvitado kun s-ro Jesudasan, kiam ni kuris por organizi ĉion, ni tamen ricevis la konvenan ejon, kie ni povis okazigi la kurson kaj la prelegon.

Cl.- Ĉu vi povus rakonti al ni tiujn kontaktojn ? Kiel ili disvolviĝis ĝis kiam vi havis la salonon, kie, se mi ne eraras, poste vi instruis esperanton. Estas tre interese scii, kiel oni povas barakti en fremda lando, ĉu ne ? Rakontu eble iomete tiun baraktadon.

SK.- Jes. Unue ni iris al la biblioteko kaj informiĝis pri la libroj, kiujn s-ro Jesudasan donacis antaŭ jaroj al la biblioteko, kaj mi jam pensis, ke eble tiuj ne plu estos retroveblaj, ĉar bruliĝis en la bindejo dum la pasintjaraj problemoj. Post tiu informiĝo ni iris al la ĉefbibliotekistino, sed tie ni devis longe atendi antaŭ ol ŝi akceptis nin, kaj ni profitis tiun tempon por iri kaj rezervi la ĉambron, aŭ almenaŭ informiĝi pri la eblo de rezervado de la aŭdvida ĉambro por nia programo.

Cl.- Ĉu vi havis ĝin senpage?

SK.- Ne. Unue, kiam ni iris tien, ni petis tion, ĉu ni povus havi la ejon kaj ili tuj diris la prezon. Kaj malgraŭ tio ni rezervis ĝin. Kaj poste ni reiris al la ĉefbibliotekistino kaj tie ni parolis pri esperanto kaj pri la donacitaj libroj. S-ro Jesudasan konis jam antaŭe tiun sinjorinon. Kaj ŝi diris al ni, jes, ŝi povas helpi nin, sed ni devas skribi leteron al la urbestro, ĉar la aktivecoj de la biblioteko dependas ankaŭ de li.

Cl.- Do, verŝajne vi vidis, ke ĉio estos fuŝita, ĉar skribi al urbestro, atendi la respondon, estas jam la fino de viaj ferioj, ĉu ne ?

SK.- Jes, la tempo tre rapide pasis, sed ni tute ne senkuraĝiĝis. La venontan tagon mi skribis la leteron al la urbestro kaj poste kun tio ni iris denove al la ĉefbibliotekistino kaj ŝi fine akceptis tion kaj tiel ni ricevis senpage, kaj por la prelego kaj por la kurso la aŭdvidan ĉambron de la publika biblioteko.

Cl.- Kaj tie okazis viaj kursoj. Eble rakontu, kiel vi instruis esperanton. Laŭ, verŝajne, la metodo, kiun ni havas en La Chaux-de-Fonds, ni paroligas konstante la lernantojn.

SK.- Jes, do mia unua kontakto kun la lernantoj estis la prelego kaj jam tiujn minutojn mi eluzis por instrui simplajn frazojn al ili en esperanto. Kaj mi instruis laŭ nia metodo, laŭ la moderna Cseh-metodo, kiun ni praktikas ankaŭ en Kultura Centro Esperantista. Do, kompreneble, mi ne havis ĉiujn aparatojn kaj necesajn instruilojn, kiujn mi uzas en La Chaux-de-Fonds, sed tamen surloke per tiu ĉi metodo oni ĉiam povas tre bone instrui. Mi multe paroligis ilin. Aŭdu momenton el tiu kurso :

« Kio estas esperanto ?
Esperanto estas lingvo.
Kia lingvo estas esperanto?
Internacia lingvo.
Ĉu ni lernas esperanton?
Jes, ni lernas esperanton.
Ĉu vi staras ?
Ne, ni ne staras, ni sidas.
Ĉu mi staras ?
Jes, vi staras. »

Cl.- Kiel vi fakte anoncis tiun ĉi kurson ?

SK.- Tuj post la akcepto, post la vizito ĉe la ĉefbibliotekistino, ni rapide pretigis la afiŝojn kun s-ro Jesudasan en la sinhala, tamila kaj angla lingvoj. Kaj ni aldonis ankoraŭ kelkajn informilojn, el tiuj, kiujn ni ricevis de UEA en la angla lingvo kaj la tuto estis tre bone kaj grande afiŝita ĉe la enirejo de la publika biblioteko dum kvar semajnoj.

Cl.- Kaj kiom da partoprenantoj ?

SK.- La prelegon ĉeestis kvardeko da personoj, kaj poste dum la kurso estis inter 30 kaj 35. La unuan tagon estis 39, sed poste ĉiam estis super tridek personoj.

Cl.- Kiom da lecionoj ?

SK.- Ni planis kvar tagojn, sed ĉar ili tiom entuziasmiĝis kaj interesiĝis pri esperanto, mi aldonis ankoraŭ kvinan tagon, kiu estis mia antaŭlasta en Srilanko.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond kaj Stefano Keller raportis pri instruo de esperanto en Srilanko. La venontan semajnon ni daŭrigos tiun ĉi raporton. Ĝis reaŭdo!